

La 16an de septembro 2013

Mensogoj de la ĉefministro venkigis Tokion

Belaj vortoj de la ĉefministro

La 7an de septembro en Buenos-Ajreso okazis la Ĝenerala Kunsido de Internacia Olimpika Komitato (IOC), kaj Tokio venkis en la elektado de la olimpika urbo en 2020. Antaŭ la voĉdono la plej granda malfavoraĵo al Tokio estis la akcidento de la Nuklea Centralo n-ro 1 de Fukuŝima. Por persvadi la komitatanojn, la ĉefministro Abe Sinzoo parolis jene:



“Tokio estas unu el la plej sekuraj urboj en la mondo, ne nur nun, sed ankaŭ en 2020. Certe troviĝas homoj, kiuj havas maltrankvilon pri la nukleaj centraloj de Fukuŝima, sed mi promesas jene. La situacio estas sub nia regado. Ili ne donos damaĝon al Tokio. Mi garantias al vi, ke la Olimpikoj okazos sekure. Ankaŭ la finaca situacio estas bonorda.

Se vi elektos Tokion kiel olimpikan urbon, tio donos novan kaj fortan inspiron al la olimpika movado. Ni volas igi la mondon pli bona loko kunlabore kun IOC.

Kaj poste okazis demandoj kaj respondoj, kaj en ĝi li respondis jene:

Konklude, la problemo de poluita akvo tute ne gravas. Vidu la fakton : influo de la poluita akvo estas blokita en 0,3 kvadrataj kilometroj en la haveneto de la Nuklea Centralo n-ro 1 de Fukuŝima.

Ni mezurigas radioaktivecon en la proksima maro. Eĉ la plej granda cifero estas 500-ono de la gvidlinio de trinkakvo difinita de Monda Organizo por Sano (WHO). La japana normo pri sekureco estas la plej severa en la mondo. Mi promesas, ke pri sano, problemo neniam troviĝis en la pasinteco, neniam troviĝas nun kaj neniam troviĝos en la estonteco. Krome, por pli perfekte solvi la problemon, ni decidis programon kaj

komencis labori por la totala solvo. Kiel la ĉefministro de Japanio mi havas respondecon pri sekureco kaj estonteco de infanoj, kaj ankaŭ pri sportistoj venontaj al Japanio. Mi plenumos la respondecon perfekte.

Reagoj de diversaj kampoj

TEPCO:

Ni volas plej frue stabiligi la situacion. La denseco de radioaktiveco ekster la haveneto estas kviono de tiu en la haveneto. Poluita akvo ne estas perfekte blokita.

*TEPCO sendis demandaron al la registaro pri la parolado de la ĉefministro. Tio signifas, ke TEPCO havas malsaman opinion pri lia parolado.

*TEPCO pendigas barilojn nomatajn ŝlimaj bariloj (*siltfence*, シルトフェンス) en la haveneto por ke poluita akvo ne eliru eksteren, sed ĝi diras, ke poluita akvo ne estas perfekte blokita. Krome ĝi ne neas la eblecon, ke forte poluita akvo el la akvokonservujoj enfluis en la eksteran maron.

Iu altranga oficisto de la Ministerio pri Ekonomio kaj Industrio:

Estas malfacile difini la ‘regatan’ staton, sed estas certe, ke ni ne povas konstati la nunan staton kiel ‘teknike perfekte regata’.

(la ĵurnalo Mainiĉi, la 10an de septembro 2013)

Konno Tomomicu, 54-jara fiŝisto en la urbo Sooma, Fukuŝima:

Ne diru bagatelaĵojn. Ĉar la nuklea centralo ne estas regata, ni suferas tiom multe pro poluita akvo. Li tute ne scias, kio okazas ĉi tie. Li diras pri sekureco ekstere, sed neniam al ni enlande. Se li havas respondecon pri siaj vortoj, faru, kion li promesis.

(la ĵurnalo Asahi, la 10an de septembro 2013)

S-ro Aida Masao, 69-jara terkulturisto, kiu rifuĝis de la vilaĝo Iitate, Fukuŝima, pro la akcidento:

La registaro diris, ke ĝi respondecas pri purigado de la tero, sed nenie troviĝas progreso. Ĝi forĵetas Fukuŝima-on. Estas ĝojinda afero, ke venos Olimpikoj al Japanio, sed la registaro havas pli gravan taskon ol la Olimpikojn.

(la ĵurnalo Asahi, la 10an de septembro 2013)

S-ro Jamana Haĵime (prezidanto de la Internacia Instituto pri esplorado por elservigo de reaktoroj, *International Research Institute for Nuclear Decommissioning*, 国際廃炉研究開発機構, fondita en aŭgusto 2013)

Ni havas donitaĵojn, per kiuj ni povas interpreti, ke radioaktiveco

restas en la haveneto de la Nuklea Centralo n-ro 1 de Fukuŝima. Kaj eĉ se ĝi elfluus eksteren, ĝi maldensiĝos kaj ne donos grandan influon. Estas bezonate, ke oni haltigu la poluitan akvon, sed ni ne scias, kie estas la fandiĝintaj nukleaĵoj, kiuj poluigas akvon. La plej granda problem estas, ke daŭras neregata akvotralikiĝo. Se ni ne povos venki la ĉefan kaŭzon, denove okazos novaj problemoj.

(la ĵurnalo Mainiĉi, la 11an de septembro 2013)

S-ino Sakijama Hisako (ano de eksa Parlamenta Komitato pri la nuklea akcidento de Fukuŝima, 東京電力福島原子力発電所事故調査委員会)

La situacio de la centralo estas pli malbona, ol en la lasta julio, kiam publikiĝis la raporto de la Komitato.

Ĉiun tagon 400 tunoj da akvo enfluas sub la reaktordomojn. Oni ne scias, de kie ĝi venas, kaj kien ĝi iras. La registaro diras, ke ĝi blokos la akvon per muroj faritaj el glaciigita tero, sed oni ne scias, ĉu tiu rimedo vere funkcios. Ĉu ni povas diri, ke la reaktoroj estas sub la regado?

Oni detektas tre fortan cezion el fiŝoj en la maro. Disĵetitaj radioaktivaĵoj vojaĝas de montoj al riveroj kaj al la maro. Oni detektis cezion ankaŭ el urino de infanoj loĝantaj en Tokio. Oni ne scias, kiun influon donos malforta radioaktiveco al sano.

(la ĵurnalo Mainiĉi, la 11an de septembro 2013)

S-ino Oohaŝi Sacuki, 20-jara loĝanto de la urbo Minami-Sooma en la radiuso de 20 kilometroj de la Nuklea Centralo n-ro 1 de Fukuŝima:

Mi havas maltrankvilon pri mia estonta sanstato. Mi ĉiam demandas min kun timo: “Ĉu mi povos edziniĝi?”, “Ĉu mi povos naski bebojn?”, “Eĉ se mi povos, ĉu ili naskiĝos normalaj?”

(la ĵurnalo Akahata, la 11an de septembro 2013)

Fundamentaj Princiloj de Olimpikismo

La unua ĉapitro de Olimpikismo tekstas jene:

Olimpikismo estas filozofio de vivo, altigante kaj kunigante en ekvilibra tuto la kvaliton de la korpo, volo kaj koro. Kunmiksante sporton kun kulturo kaj edukado, Olimpikismo celas krei vojon de vivo surbaze de la ĝojo de klopodado, eduka valoro de bona ekzemplo, sociala respondeco kaj respekto por universala fundamenta etika principoj.

La japana popolo estas bone organizita, do la Olimpikoj en 2020 bele sukcesos, se solviĝos la nuklea akcidento en Fukuŝima ĝis 2020, ne okazos aliaj gravaj akcidentoj en aliaj reaktoroj kaj ne atakos Tokion alia grandega tertremo, kiun oni antaŭvidas kun certeco de 70% en la venontaj 30 jaroj. Sed tiuj Olimpikoj okazos ne “surbaze de la ĝojo de klopodado, eduka valoro de bona ekzemplo, sociala respondeco kaj respekto por universala fundamenta etika principoj”, sed surbaze de “mensoga klopodo de la ĉefministro, eduka valoro de malbona ekzemplo, sociala senrespondeco kaj malrespekto al viktimoj de la nuklea akcidento”. Kian valoron havos tiuj Olimpikoj en Tokio en 2020?

Hori Jasuo